EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IFEF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

Marto 12

# La esperantistoj havas propran sanktulon!

La 4-an de marto 2022 en Vatikano papo Francisko prezidis la Publikan ordinaran konsistorion por la proklamo de dekretoj por tri novaj sanktuloj:

- beata Titus Brandsma, sacerdoto, karmelano, martiro
- beata  Maria Rivier, fondantino de la Kongregacio de la fratulinoj de la Entempligo de Maria
- beata Maria di Gesù (Carolina Santocanale), fondantino de la Kongregacio de la fratulinoj kapucenaj de la Dipatrino de Lurdo

La solena sanktproklamo okazos je la 5-a Paska dimanĉo, la 15-a de majo 2022. Ni, membroj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista aparte ĝojas, ke inter la novaj sanktuloj troviĝas la nomo de kaj nia membro kaj nia ĉiela patrono, Titus Brandsma! Li estas la unua Esperantisto kiu iĝis sanktulo!

Titus Brandsma (Anno Sjoerd Brandsma) naskiĝis la 23-an de februaro 1881 en Ugoklooster apud Bolsward kaj martire mortis la 26-an de julio 1942 en la koncentrejo Dachau. Li estis frisa karmelana patro, katolika sacerdoto, profesoro pri filozofio, ĵurnalisto, verkisto, tradukisto, kontraŭnaziulo kaj esperantisto. En *Espero Katolika* 11/1985 per la teksto "La moderna martiro Tito Brandsma estis Esperantisto" oni mallonge skizas la vivon de p. Titus. La du-paĝan tekston mi aldonas.



Ankoraŭ estas prilaborata lia Esperanta-profilaĵo. Ni ja scias ke li aktivis en la katolika E-rondo en la unuaj jaroj de la ekzisto de IKUE. En la jarlibroj de IKUE, ni trovas lian nomon, ekz. jaroj 1926, 1928, 1931-32, 1938.

Okaze de la 4-a jarkunveno de "Nederlanda Katoliko" (Nederlanda katolika E-Ligo), en 1913 en s'Hertogenbosch celebris la meson por la vivantaj kaj mortintaj membroj (v. EK 6.1913). Li recenzis la eldonaĵojn, kaj ankaŭ gvidis la Komisionon de legado kaj studado de "Nederlanda Katoliko" (1922). Li estis inter la organizantoj de la Kongreso de Nederlanda Katoliko (’s-Hertogenbosch, 1934), same inter la membroj de honora komitato kaj ankaŭ inter la partoprenantoj de la 19-a IKUE kongreso (1937, Hago). Do, ni povos konkludi, ke li apartenas al la pioniroj de la katolika Eo-movado.

En la Virtualaj Tagoj de IKUE (2020) kaj Virtuala Kongreso de IKUE (2021) oni dediĉis atenton al la martiroj ligitaj kun la Eo-movado. Ni atenton donis al Sta Maksimiliano Kolbe, la ĉiela patrono de IKUE (pasintjare ni memoris 80 jarojn de lia martira morto) kiu ja ne estis mem esperantisto, sed bone komprenis la ideon kaj subtenis la lernadon. Ĉiu 14-a tago de la monato estas nomita "Kolbe-tago" okaze de kiu dum la virtualaj kunvenoj oni strebas pli bone ekkoni tiun sanktulon. Fine de la Virtuala Kongreso (14.-21.8.2021) estis proponite, ke en la jaro 2022 dum kiu ni memoras 80 jarojn de la martira morto de Titus Brandsma, estu aparta atento dediĉita al pli bona kono de tiu ĉiela patrono. Ĉiu 27-a tago de monato estas nomita "Titus Brandsma - tago".

Ĉuj, kiu trovis informojn pri al Eo-agado de Titus, bv. tion komuniki al: ikue.reto@gmail.com . La vivo kaj agado de Titus estu vojmontriloj por niaj vivoj kaj interhomaj rilatoj kaj por niaj streboj ke la mondo iĝu pli bona, pli paca kaj pli justa!

Marija Belošević, prezidantino de IKUE

## Redakcia ŝanĝo por EKO ekas

Ni anoncas modifon en la gvida grupo por ls EKO-komunikoj. Iliaj taskoj estas lingve kontroli la sendotaĵojn, foje je severaj limoj. Dua tasko estas kontribui aperigindajn erojn, da kiuj estas definitive neniu manko, male, la redakcio dronas en materialo.

La nova teamano estas s-ino Elda Doerfler el Triesto, multjare aktiva esperantisto kaj la prezidanto de ELF-AREK, nia asocio por filatelistoj kaj kolektantoj.

## Prepare al la 8a AKE – vidu la postajn paĝojn!

Tiu kongreso alvenas pli rapide ol eblas imagi!. Jam nun necesas komenci la preparajn. La Afrika Komisiono lanĉas alvokon por instrui Esperanto al pli da senegalanoj.




La temo de la kongreso:

Esperanto – ŝanco kaj ne minaco por Afriko

Por la AMO-seminario tie, ni jam proponis temon.

**Subtenu la Kongreson. Venigu homojn el apudaj landoj!**

# La 8-a Afrika Kongreso

## Tieso, Senegalo, 23-26 decembro 2022

La Oka Afrika Kongreso okazos en Senegalo fine de 2022. Ni rapidas doni bazajn informojn, nelaste per ĝia jam aperinta Unua Bulteno (UB), kiun ni alkroĉas. La kongreson prizorgas la Afrika Komisiono de UEA. Precipe por potencialaj kongresanoj el aliaj kontinentoj, jen bazaj temoj:

**Allogaĵoj de la Lando:**

Ekkono de esperantistoj el Senegalo kaj aliaj afrikaj nacioj.

La abunda ekskursa oferto estas prezentita en UB. Du duon-tagaj ekskursoj estas proponitaj, kune kun unu tut-taga ekskurso. Legu mem.

La averaĝa temperaturo en Dakaro kaj apudeco estas mimimume 21 gradoj, la maksimumo 27 gradoj C (81 gradoj F). Unuvorte: paradiza. Pluvo ĉ. 1 mm, pluvo atendata en unu tago de la monato. Blua ĉielo atendebla, Dakar ĝuas tra decembro 239 horojn da suna vetero. Pli da informoj kaj mia fonto:

https://weather-and-climate.com/Dakar-December-averages (angle)

**La virusa situacio:**

11 novaj kazoj en la lastaj 24 horoj. Sumaj infektoj depost la komenco: 85,768, Sumaj mortoj: 1,962, preskaŭ ĉiuj en 2021. Je marto 2022 ricevis vakcinojn 2,493,984 homoj el tuta popolo de 15.9 milionoj. (ĉ. 15%). Jes, tio modestas, dank' al la avareco kaj malsolidareco de la mondo, sed Afriko havas grandan tradicion kaj kapablon rezisti infektojn. Tre eble la risko en Senegalo ne plias ol en grandaj partoj de la cetera mondo.

Laŭ MOS: https://covid19.who.int/region/afro/country/sn

**La atingeblo:**

La flughaveno de Dakar ege proksimas al Thies, la kongresurbo. Eĉ ne necesos eniri la urbon Dakar, kiun vi ja povos viziti per duontaga ekskurso. Flugoj venas el multaj landoj, per multaj kompanioj.

> El Portugalio (Lisbono): flugo inter 216 kaj 225 EUR (RAM aŭ Air Senegal). Simila prezo el Parizo.(CDG)
>
> El Nov-Jorko la plej favora prezo nun estas US$ 446.


Evidente, tiuj informoj estas nunaj kaj nur indikaj. Per EKO, ni donos pli freŝajn informojn ekde la jarmezo.







Supre, flugkompanioj, kiuj flugas momente al Senegalo, sube: el iuj flughavenoj\






8-a Afrika Kongreso de Esperanto

26-30 de decembro 2022

Tieso, Senegalo

**La kongresaj kondiĉoj:**

La UB prezentas bildon de la kongresejo, en lertigejo Tostan, kiu liveras loĝigon en diversaj kategorioj kune kun manĝebloj., ĉio tre malmultekosta laŭ eŭropaj normoj. Per EKO ni donos pliajn informojn poste.

**Afrika partopreno:**

Evidente la kongreso bezonas partoprenontojn el aliaj afrikaj landoj. Kredeble, anoj de la Afrika Komisiono partoprenos. Sed ni devas zorgi, ke junaj lernintoj kaj aktivemaj homoj povu partopreni. En la Kongreso okazos AMO-seminario kaj la AMO-programo disponigis el ricevita donaco la sumon de € 500 por kontruibui al la aliraj kostoj. Evidente, tio modestas, kaj celis esti nur komenco por granda kampanjo. La nun konstruata retejo por la kongreso baldaŭ prezentos eblojn kontribui al tiu celo, por garantii, ke Afrika Kongreso havu afrikajn partoprenantojn.

**La kostoj:**

Praktika informo por kompreni UB: se FXOF egalas XOF, unu eŭro egalas momente ĉ 665 XOF (la francaj frankoj de okcidenta afriko).  Do, du-persona ĉambro nokte kun ventumilo kostos ĉ. € 26; unu-persona € 28. Kun klimatizilo, iom simile, sed realisme, kun 27 gradoj, kiu bezonas klimatizadon?.

**La lingvoj:**

La franca estas la koloniisma lingvo – ĉ. 20% de la popolo iel parolas ĝin. La ĉefa origina lingvo estas Wolof, kiun parolas ĉ. 80 de la popolo.

## Resume: Serioze pripensu eskapon el la sovaĝa Eŭropa aŭ Nord-amerika vintro. Ĝuu neforgeseblajn tagojn inter veraj kaj dediĉitaj esperantistoj!

========= vortoj:  1150 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.